

Somera migrado en Gotardo organizita de Svisa Esperanto-Junularo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 569, 1974.09.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De la 17-a ĝis la 22-a de julio ni partoprenis la someran migradon en Gotardo, kiun majstre organizis Svisa Esperanto-Junularo. Ni ne raportis pli frue pri tiu esperanto-aranĝo, ĉar ni volis atendi, ke niaj feriantaj geaŭdantoj, kaj inter ili ĉefe la marŝemuloj, ree estu hejme por povi nin aŭskulti. Al ili ni tuj sciigas, ke la venontan jaron Svisa Esperanto-Junularo ree aranĝos someran migradon en la svisa montaro.

A.- La migrad-informilo bone priskribis la partoprenkondiĉojn. Ni citas : « Ni dormos en niaj dormosakoj en diversaj kabanoj kaj amasloĝejoj laŭlonge de la vojo. Ni manĝos kune en la tranoktejoj kaj kunprenos de tie la piknikojn por la tagmanĝo. La marŝado daŭros almenaŭ po 4 horojn kaj maksimume 8 horojn tage. Krokodilado ne estos tolerata. »

Cl.- Tiuj striktaj aranĝaj kondiĉoj limigis la nombron de la partoprenantoj al 11 : multaj timis ne povi elteni 8 horojn de marŝado. Kaj aliaj lertaj marŝantoj ne povi aliĝi, ĉar familianoj estis krokodiloj.

A.- Tiuj severaj aliĝkondiĉoj favoris la kreon de tre homogeno grupo, kiun formis belgo, gefrancoj, germanino, polo kaj gesvisoj.

Cl.- Neniam tranokti dufoje en la sama kabano signifas, ke ĉiutage oni devas foriri, eĉ se la vetero ne invitas al migrado. Tio bedaŭrinde okazis kvarfoje. Kaj ni rimarkis, ke kiam oni ekskursas malgraŭ la kontraŭaj kondiĉoj : pluvego, neĝado, la marŝado tamen montriĝas agrabla. La monton oni devas lerni koni je ĉiuj veteroj. Kiam la ŝuoj transformiĝas en spongon, eĉ la plej malkomforta mont-kabano aspektas palace.

A.- La forirtagon la renkontiĝo okazis en la trajno veturanta de Zürich al Airolo tra la gotarda tunelo. Ni eniris la trajnon kelkajn staciojn antaŭ tiu ĉi tunelo. Tiam ni konstatis, ke la gvidantoj Maŭrico kaj Danjel tuj ekzamenis niajn ŝuojn kaj tornistrojn kun atento. Ili rimarkis, ke ni scias, kio estas la marŝado en la montaro. Kelkaj partoprenantoj ne estis tre bone ekipitaj. Tamen ili kapablis sekvi la grupon la tutan migradon, eĉ se iliaj ŝuoj iom glitis sur la neĝo kaj se iliaj tornistroj ne estis tre bone adaptitaj al la transporto de la migrada materialo.

Cl.- Kiel estas la kutimo en Svislando, la migrado komenciĝis en kafejo. Kaf-trinkado kaj manĝado de apetitigaj lunbulketoj donas kuraĝon, eĉ se la vetero ne estas tre alloga. La tutan tagon ni laŭiris la valon Leventina sekvante la altan vojon en la itala **Strada Alta**. Agrabla promenado sur la suna flanko de tiu bela valo kondukanta al la konata Tiĉino, bona kaj longa marŝekzerco sen tro da deklivoj. Pin- kaj kastan-arbaroj, multe da bongustaj mirteloj, riĉa flaŭro kun ruĝaj kaj blankaj lilioj, tipaj vilaĝoj, ĉio tio estis bedaŭrinde akompanata de konstanta pluvado, pro tio ĉiuj aprezis la unuan tranoktejon en la vilaĝo Osco.

A.- La duan tagon ni komencis alsupri por trairi la pasejon Predelp. Duonsuno agrabligis tiun ascendon de pli ol mil metroj en arbaro, poste sur paŝtejoj kaj fine sur alpejoj, kie fajfis marmotoj kaj blekadis ŝafoj. Stefano, la belgo, kiu estas birdamiko, observadis la faŭnon per lorno. Kaj ĉiuj multe fotis la pejzaĝon, kie la montsuproj bedaŭrinde sin kaŝis en la nubaro. Ĉe la pasejo malvarmega vento nin atendis. Poste eĉ neĝetis kaj longdaŭra ĉielarko vekis nian

admiron. Strangaj pejzaĝoj en geologie interesa valo, kaj fine la kabano Cadagno, kiu situas apud lago. Dum la nokto neĝadis.

Cl.- La trian tagon ĉiuj lernis, kio estas alfronti la neĝon en montgrimpado. Ni sekvis tre belan vojon, kiu vidigis al ni multajn alpajn lagojn. Fine ni troviĝis en la vintro. Je 2500 metroj de alteco ĉio estis blanka. Sed la kabano Cadlimo, kabano de la limo, estis komfortega kaj la ripoztempo longa.

A.- Pro la vintra vetero la kvaran tagon ni devis rezigni trairi krutan pasejon. Pro tio ni iom post iom forlasis la vintron laŭirante imponan valon, kie ni havis la okazon vidi fiŝistojn kaptantajn trutojn en glacieja rivero kaj kie nin salutis ŝafaro. Ni devis ĉirkaŭiri montaron, pro tio parto de la migrado efektiviĝis aŭtobuse kaj trajne. Tamen la vesperon, alsuprante al la tranoktejo Milez apud la pasejo Oberalp, ni sentis lacecon. Ni poste konstatis, ke ni marŝadis pli ol 27 kilometojn. Ni konatiĝis kun la vivo en la kantono Grizono kaj kun la romanĉa lingvo.

Cl.- La kvinan tagon la vekiĝo ne estis tre agrabla. Ni aŭdis pluvegi. Pro tio la matenmanĝo transformiĝis al tagmanĝo kaj tre malfrue ni alfrontis la akvozan monton. La padoj estis pli rojoj ol vojoj. Ni lernis, kio estas marŝadi en la fandiĝanta neĝo. En la pasejo de la kruceto aŭ svisgermane Chrüzlipass la gvidanto uzis la kompason, tiom la nebulo estis densa. Sed post alvalado sur vojo, kiu saltigis nin de ŝtonego al ŝtonego, ni fine vidis la kabanon Etzlihütte en beliĝanta pejzaĝo. La suno sin montris en blua ĉielo. La montsuproj estis tute blankaj. Hundo kaj kaban-gardisto nin bonvenigis. Kiel kutime ni estis tute malsekaj. La vespermanĝo estis vera bankedo.

A.- La sesan tagon ni fine sentis la sunon nin brunigi. Bela descendo sur tre dekliva vojeto. La fot-aparatoj ree povis funkcii. Lasta komuna manĝo en la restoracio de la unua vilaĝo. Kaj alvenis adiaŭa manpremado. Du kunuloj, la polo Stanislav kaj la belgo Stefano, kiuj ankoraŭ havis unu liberan tagon, volis realsupri al nova kabano. Seshora marŝado ilin ne plu timigis.

Cl.- Ju pli ni alvaladis, des pli la temperaturo altiĝis. Ni estis kontentaj ne devi alsupri, tiom ni jam ŝvitis. Ni forlasis la aliajn grupanojn en la trajno, ĉar ankaŭ ni havis ankoraŭ liberan tagon por daŭri nian restadon en alia alpa valo. Ĉiuj estis ege kontentaj pri tiu bonege organizita migrado en la gotarda regiono.

A.- Ĉu la venontan jaron ankaŭ vi partoprenos la antaŭviditan novan migradon en la svisaj Alpoj. Tiam bone pretigu viajn gambo-muskolojn kaj petu la informilon al Radio Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!